# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-12 n-ro 383

## La subakvigo de la naskiĝejo de la civilizacio



Ministra Konferenco de MOK fokusiĝas pri multflanka komerca reĝimo

Virino simulis gestolingvan interpretadon

Kiel la moderna homo konkeris la mondon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

**Ministra Konferenco de MOK fokusiĝas pri multflanka komerca reĝimo**
*11a Ministra Konferenco p. 03*

**Virino simulis gestolingvan interpretadon**
*Gestoj faritaj de ŝi estis falsaj kaj ili signifis nenion p. 03*

**La subakvigo de la naskiĝejo de la civilizacio**
*Unu el la plej malnovaj kontinue loĝataj lokoj sur la Tero p. 04*

**Kiel la moderna homo konkeris la mondon**
*Kiam kaj kiel la moderna homo forlasis la Afrikan kontinenton p. 08*

**Hodiaŭe**
*Gustave Flaubert; Jiří Mahen; kaj Piramidoj p. 09*

# Ministra Konferenco de MOK fokusiĝas pri multflanka komerca reĝimo

Dimanĉe en la argentina ĉefurbo Bonaero malfermiĝis la 11a Ministra Konferenco de la Monda Organizo pri Komerco (MOK). La 4-taga kunveno fokusiĝas pri multflanka komerca reĝimo kaj agrikulturo, liberigo de investo, kaj elektronika komerco.



Krom la ĝenerala direktoro de la MOK, Roberto Azevedo, kaj la argentina eksministro pri eksterlandaj aferoj, prezidanto de la ministra konferenco, Susana Malcorra, ankaŭ Argentina Prezidento, Mauricio Macri, Brazila Prezidento Michel Temer, Paragvaja Prezidento Horacio Cartes kaj Urugvaja Prezidento Tabaré Ramón Vázquez Rosas ĉeestis la inaŭguron kaj faris paroladojn.

Macri diris, ke komerco ĉiam estas la ŝlosila motoro de ekonomia kresko de post la starigo de la MOK. Nun la monda ekonomio troviĝas en la periodo de profunda transformiĝo, kaj ekonomia tutmondiĝo alfrontas defiojn, kaj ĉiuj rilataj partioj havas la respondecon preni tiujn defiojn kiel oportunojn. Li vokis al la reprezentantoj diskuti kiel komune klopodi por ke internacia komerco profitigu pli da homoj kaj akcelu disvolvadon de la tuta mondo.


Temer diris, ke multflanka komerca reĝimo estas la fundamenta sistemo por grandigo de komerco, pliigo de investo, kreado de laborpostenoj kaj komuna prospero kaj ankaŭ grava ilo por deteni protektismon kaj certigi komercan justecon.

Yu

---

# Virino simulis gestolingvan interpretadon

La 28-an de novembro gazetara intervjuo okazinta en Usono allogis atenton. Tiam la polico de subŝtato Florido estis koniganta serion da mortigoj en la urbo Tampo, kiam iu virino sin starigis apud la proparolanto kaj ektrakukis la eventon pere de la gestolingvo por surduloj. Tamen la policistoj poste konstatis, ke ŝi ne estis kontraktita por fari tion, kaj ŝia ludado ja ne kongruis al gestolingvo.



Tiu virino estis identigita kiel Derlyn Roberts, ŝi simple alvenis en la lokon kie la evento estis okazanta, kaj nenion dirante ŝi ekgestadis. Sed surduloj kaj mutuloj kiuj televide spektis tiun scenigadon rimarkis, ke la gestoj faritaj de ŝi estis falsaj kaj ili signifis nenion.

Oni ne scias kial Roberts faris tian falsan tradukadon. Laŭ la usona gazetaro ŝi jam diversfoje estis arestita pro trompo. La polico estis supozinta, ke la virino estus ies subkontraktita tradukisto, sed ne rekte de la polico.

Jen rilata filmeto (vidu).

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# La subakvigo de la naskiĝejo de la civilizacio

*Hasankeyf* estas unu el la plej malnovaj kontinue loĝataj lokoj sur la Tero, sed nova baraĵo minacas tiun arkeologian juvelon en Turka Kurdio.



En Kurdio alproksimiĝas la finstadio de unu el la plej polemikaj baraĵoj en la mondo. Lokaj loĝantoj, civilsociaj organizaĵoj kaj internaciaj aktivuloj tamen plu batalas por bloki la projekton. La *Ilisu*-baraĵo troviĝas en la sudoriento de Turkio sur la Tigriso-rivero. Tiu giganta artefarita lago senhejmigos ĉirkaŭ 78 000 homojn, la plimulto de ili kurdoj. 199 vilaĝoj kaj la historia urbo *Hasankeyf* tute aŭ parte subakviĝos. Ankaŭ ĉirkaŭ 3 000 nomadaj familioj kiuj vivas en la regiono estos forpelitaj. Preskaŭ duono de la damaĝitaj homoj – kaj inter ili ĉiuj nomadoj – ne posedas teron aŭ ne havas proprietaktojn. Ili do neniun kompenson ricevos. Nek tero estas provizita, eĉ ne por agraraj vilaĝanoj kiuj povas prezenti proprietakton, ankaŭ ne iu kompenso por la perdo de ilia fonto de enspezoj. Ili povos maksimume esti certaj pri tro malalta elaĉetsumo por sia proprietaĵo. Poste ili devas mem zorgi aliloke pri nova restadejo. Ĉiuj damaĝitaj familioj estos do konfrontitaj kun la perdo de siaj domo kaj porvivaĵo, la perturbo de siaj komunumaj kaj familiaj strukturoj kaj ebla estonto en malriĉeco en pli grandaj urboj.

La centralizisma sinteno de la Turkia registaro ne permesas iun ajn eblecon por partopreno de la damaĝita loĝantaro aŭ civilsociaj organizaĵoj rilate iun ajn aspekton de la projekto. Ĉio estas preskribita kaj decidita en *Ankara*, kie la Ŝtathidrolika Konstrukompanio (SK) kunordigas la projekton nome de la Turkia registaro. Turkiaj ĵurnaloj anoncis ke la *Ilisu*-projekto estas preta je 97%. Tio estas pridiskutebla ĉar oni ankoraŭ daŭre konstruas la hidro-elektran centralon sur la tereno kaj i.a. la novajn pontojn. Ankara sciigis ke la damaĝita loĝantaro estas reloĝigota sekvontan jaron kaj ke la regiono estos subakvigata je la komenco de 2019. En junio ĉi jare la vojoj apenaŭ pretiĝas.

***Hasankeyf***

Unu el la plej malnovaj kontinue loĝataj lokoj sur tero, la 12 000 jara malnova urbo *Hasankeyf*, estos subakvigita kaŭze de la baraĵo. Estas loko de ekstraordinara beleco kiu estas difinita kiel la mezopotamia naskiĝejo de la civilizacio. En *Hasankeyf* kaj ĝia tuj apuda ĉirkaŭaĵo troviĝas centoj da monumentoj kaj miloj da neolitikaj grotoj el kiuj multaj estis loĝataj ĝis antaŭ ne longe. *Hasanbeyt* troviĝis dum jarcentoj sur la Silka Vojo kaj estis unu el la plej grandaj urboj en la mezepoko. Spuroj estas troveblaj de 20 diversaj orientaj kaj okcidentaj kulturoj. En la tuta regiono oni bezonus ankoraŭ fari dum multaj jaroj prudentajn kaj sistematikajn arkeologiajn elfosadojn por prizorgi ke la kultura heredaĵo ne perdiĝu. La malnova urbo HASANBEYT plenumas la kondiĉojn por esti rekonita de Unesko kiel

kultura heredaĵo, sed la turka ŝtato nemiam prezentis peton pri tio. Malgraŭ la multnombraj alvokoj de aktivuloj por protekti la regionon, Unesko ankoraŭ entreprenis neniun agadon.

En 2010 la turka registaro komencis la konstruon de la betonbloka urbo "Nova *Hassankeyf*", kien la loĝantoj de la damaĝita regiono eventuale povas transloĝiĝi. Tamen, ili devas pagi por la novaj domoj, kiuj kostas du- aŭ trifoje pli ol la kompenso kiun ili ricevas de la registaro. Tio grave ŝuldigus multajn familiojn. Laŭ la "Iniciato por Gardi *Hasanfeyf* Vivanta", du trionoj de la homoj el la damaĝita regiono kiuj prezentis peton por apartamento en *Nova Hasankeyf* estis rifuzitaj de SK. La novaj apartamentoj estus anstataŭe venditaj al pli riĉaj homoj el aliaj urboj, kio kaŭzus tute alian socian strukturon en la nova urbo. SK antaŭvidas ke la unua parto da apartamentoj estos disponeblaj je la fino de 2017, sed laŭ onidiroj la konstruaĵoj estas subkvalitaj, ĉar ege tro haste konstruitaj.

En majo la *Zeymel Bey* Tombomonumento, la unua de naŭ fragilaj monumentoj, estis komplete transloĝigita kun la celo konstrui "kulturan parkon" en *Nova Hasankeyf*. Unu de la nuraj du eŭropaj entreprenoj kiuj estas envolvitaj en la tuta *Ilisu*-projekto, estas la nederlanda *Bresser Eŭrasia*, kiu okupiĝas specife pri la translokado de la hasankeyfaj arkeologiaj monumentoj. Tiele la entrepreno kunkulpas pri la fakta detruo de grandvalora heredaĵo. La ironio de la detruo de urbo, kiu estis loĝata de post 10 000 antaŭ KRISTO por konstrui "kulturan parkon" ŝajne tute preterpasas la atenton de la turka registaro. *Ankara* volas plenigi kun rubo pli ol 200 neolitikajn grotojn en la ĉirkaŭaĵo de la urbo. En aŭgusto malkonstru-entrepreno ricevis la taskon eksplodigi rokmuron per dinamito. La detruo, registrita sur videobendoj kaj fotoj, kolerigis homojn kaj organizaĵojn en la regiono kaj en tuta Turkio. La provincestro kaj la SK defendis sin klarigante ke la celo estis protekti la lokan loĝantaron kontraŭ falantaj ŝtonegoj. Mehmet Ali ASLAN, parlamentano por la pro-kurda Demokrata Popola Partio (HDP), por protesti sin katenigis al roko, pro kio la malkonstruado estis kelktempe haltigita. Mehmet deklaris ke li revenos kun pli da homoj se la dinamito-teamo rekomencus la laboron.

En 2015 la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj akceptis la proceson de kvin individuoj kiuj kontestas la detruon de kultura heredaĵo. Ili atendas verdikton ĉi jare.

**Milistigo**

Ĵurnalistoj Elza EGRET kaj Tom ANDERSON priskribas en freŝdata artikolo en la brita magazino *Red Pepper* kiel ili vojaĝis la lastajn jarojn kvar foje al la *Hasankeyf*-regiono por kontroli la progreson de la baraĵo. El la intervjuoj kun la lokaj loĝantoj en 2015 montriĝis jam klare ke la sumoj proponitaj al ili por la devigaj transloĝiĝoj estis absolute ne sufiĉaj. Dum ilia lasta vizito al la regiono, EGRET kaj ANDERSON, survoje al la loko de la *Ilisu*-baraĵo estis konfrontitaj kun militistaj kontroloj kaj esplordemandadoj. Kiam ili vizitis *Novan Hasankeyf* la polico avertis ilin ne fotografi. De tiam la situacio nur pli malboniĝis. Publikaj manifestacioj preskaŭ neebliĝis kaj la regionoj ĉirkaŭ *Hasankeyf* estis deklaritaj militistaj terzonoj. "La militistigo atingis tian nivelon ke ne plu eblis viziti la lokon kiel sendependa esploristo", deklaris la Iniciato por Gardi *Hasanfeyf* Vivanta. Tiu ĉi somero Mathias DEPARDON, fotografisto por *National Geographic*, estis arestita en *Hasankeyf* kie li laboris je raporto pri la kultura heredaĵo de la regiono. Li estis sen pardono elpelita.

La turka registaro promocias la baraĵon kun la perspektivo de elektro, "ekonomia kreskado, pli altaj enspezoj kaj novaj eblecoj por regiono kiu urĝe bezonas tion". Tamen estas ankaŭ kelkaj nepublikaj kialoj por la konstruo de la baraĵo. Unue ĝi forpelos la kurdan popolon el iliaj vilaĝoj, disrompigante la konekton inter iliaj tero kaj kulturo. Turkio klopodas jam dum multaj jardekoj asimili la Kurdojn en la lando. "Asimilado estas ege pli facila en urboj, kie la homoj parolas malpli la kurdan lingvon kaj kie la rilatoj kun la tradicia kurda kulturo estas pli malforta", klarigas la kurda aktivulo Ercan AYBOGA. "Tiu baraĵo subpremos, kontrolos kaj ekspluatos la Kurdojn". Ercan rakontas ke la *Ilisu*-projekto ankaŭ rilatas al kapitalisma profitemo. "Ĝi ŝanĝos la ekonomiajn karakterizojn de la tuta regiono. Ĝi senhejmigos la homojn kaj asimilos ilin en la kapitalista produktadciklo.

Alia kialo pro kiu Turkio nepre volas konstrui la baraĵon estas limigi ankoraŭ pli la liberecon de moviĝo de la gerilanoj de la PKK (Kurda Laborista Partio). La konstruado de turkaj militistaj fortikaĵoj sur la montpintoj kiuj ĉirkaŭas la baraĵon, jam certigas por la turka armeo pligrandan kontrolon de la tuta regiono.

La evakuadoj en la regiono, kaŭzitaj de la *Ilisu*-baraĵo, apartenas al pli vasta politiko de perforto kaj trudinsistaj transloĝigoj en *Bakur*, la kurda regiono ene de la turkaj limoj. En la jaroj 1990 miloj da kurdoj estis murditaj aŭ malaperis por ĉiam. Pli ol 3 000 kurdaj vilaĝetoj estis detruitaj ĝis tuta forigo. Ekde 2015 la turka ŝtato lanĉis la plej grandan militistan kampanjon pri senhejmigo de la kurdoj depost la jaroj 1990. En diversaj urboj en tuta *Bakur* la kurdaj enloĝantoj sin deklaris aŭtonomaj de la turka ŝtato kiel reago al la perforto de la armeo kaj la subpremado de la kurdaj movadoj. Ili barikadis siajn kvartalojn por ne allasi la armeon kaj policon. La respondo de la militistoj estis senkompata. Ili atakis la enloĝantoj kun tankoj kaj helikopteroj. Ekde tiam la kurdaj komunumoj en la urboj estas konfrontitaj kun arestadoj, mallibereco kan kunordigitaj atakoj de la polico kaj armeo. Laŭ Ercan AYBOGA la inundigado kaj detruo de *Hasankeyf* estas en la logiko de la detruoj kaŭzitaj en partoj de almenaŭ sep urboj en *Bakur* dum la lastaj semajnoj kaj monatoj.

La kurda loĝantaro de la *Sur*-distrikto en la provinco *Diyarbakir* (*Amed* en la kurda lingvo) estas nuntempe ankaŭ viktimo de la trudinsistaj transloĝigoj. Sur estis unu el la regionoj kiuj sin deklaris sendependaj. Post la subpremado de la rezisto en *Sur* en 2016, la turka armeo detruis trionon de la malnova urbo. Forpeladoj ankoraŭ ĉiam okazas kaj celas rompi la solidarecon en la komunumo kaj plivalorigi la urbon por pli riĉa publiko. La risko de perforto kaj senhejmigo ege pligrandiĝis pro la solidigo de la ŝtatpotenco ekde la fiaska puĉo kontraŭ la reĝimo de prezidento ERDOGAN en julio 2016. Ekde tiam centmiloj da homoj en tuta Turkio estas arestitaj kaj malliberigitaj, pli ol 140 komunikilkanaloj estis ĉesigitaj kaj pli ol 2 000 lernejoj fermitaj. Pro la nacia reprezalio pluraj regionoj en la ĉirkaŭaĵo de *Hasankeyf* estas deklaritaj militistaj terzonoj. Tie svarmas Armitaj sekurecaj servoj kiuj devas "protekti" la Ilisu-projekton.

**Akvo kiel armilo**

La turka registaro pretendas ke la *Ilisu*-baraĵo havos "grandegajn medio-avantaĝojn". Tamen ĝi subakvigos 400 km da valoraj naturareo kaj havos katastrofajn sekvojn por la ekosistemo de la Tigrisobaseno. La malofta Eŭfrato-testudo (*Rafetus eŭphraticus*) estas nur unu de la

multnombraj malaperontaj specioj kiuj troviĝas tie. La baraĵo havos ankaŭ gravajn konsekvencojn por Sirio kaj pli speciale por Irako. Ambaŭ landoj dependas de la riveroj Tigriso kaj Eŭfrato por sia akvoprovizado en la urboj kaj por la irigacio de siaj kulturgrundoj. La konservkapacito de la *Ilisu*-rezervujo povus dum monatoj haltigi fluon de la Tigriso al Irako, kio signifas gravan profanadon de la rajto pri akvo por la loĝantoj de la bordaj ŝtatoj kiuj troviĝas laŭflue de la baraĵo. La mezopotamiaj marĉoj en Irako – grava ekosistemo – estos detruitaj.

Krom tio la barado de la Tigriso ebligas Turkion uzi akvon kiel politika armilo. En 1992 la tiama ĉefministro de Turkio, Suleyman DEMIREL, diris:"Sirio, nek Irako povas havi rajtojn je la turkaj riveroj, same kiel *Ankara* ne povus havi rajtojn pri ilia nafto. Tio estas afero de suvereneco. Ni havas la rajton fari kion ni volas. La akvofontoj apartenas al Turkio kiel la naftofontoj al ili. Ili ne partoprenigas siajn oleofontojn kun ni kiel ni ne partoprenigas niajn akvofontojn kun ili". Aktivulo Erkan AYBOGA diras:" Turkio jam en la pasinteco uzis la akvon kiel politika armilo kontraŭ Sirio kaj faras tion nun kontraŭ la aŭtonoma kurda regiono *Rojava*, en la nordo de Sirio. Inter aprilo kaj junio de tiu ĉi jaro, *Ankara* haltigis la akvon de la Eŭfrato tiel ke Rojavo havis problemojn de manko de elektro kaj konsiderindan malpliiĝon de akvorprovizado por duonmiljono da homoj.

Bedaŭrinde la *Ilusu*-baraĵo ne signifas la fino de la historio. Turkio estas unu el la plej agemaj baraĵkonstruistoj en la mondo. Ĝi jam nombras 635 grandajn baraĵojn. La *Ilisu*-baraĵo dependas de la Sud Anatoli Projekto (SAP) kiu celas la konstruadon de 22 baraĵoj kaj 19 hidro-elektraj centraloj sur la Tigriso kaj la Eŭfrato. Laŭ kelkaj ekspertoj la elfinita SAP-projekto malpliigus la akvofluon al Sirio de 40% kaj al Irako de prefere 80%. Kiel parto de la SAP-projekto oni planas i. a. la konstruadon de baraĵo en *Cizre*, laŭflue de la *Ilisu*-baraĵo. Por funkcii, la *Cizre*-baraĵo plene dependus de la *Ilisu*-baraĵo. La plano antaŭvidas ke la dua baraĵo kaptas la akvon kiu venas de *Ilusu* kaj forkondukas ĝin por la irigacio de la agrikulturo. La konstruado de la *Sizre*-baraĵo rezultos tre probable en plia izolado kaj forpelado de la kurdoj de iliaj teroj.

**Rezisto estas necesa**

La pasintajn jarojn aktivuloj organizis tra la tuta mondo faskon da agadoj por klopodi haltigi la konstruon de la *Ilisu*-baraĵo. La kampanjoj sukcesis veki sufiĉe da atento. Ili kaŭzis malakcelojn kaj kunhelpis por ke la eŭropaj eksport-kreditinstitucioj retiriĝis el la *Ilisu* projekto. En 2009 la famkonata turka kantisto TARKAN aliĝis al kelknombraj agadoj por la konservado de *Hasankeyf* kaj en 2012 kaj 2013 baraĵ-aktivuloj el Sudirako kaj eĉ el Brazilio iris al la malnova urbo por protesti. Jam en 2006 oni fondis la lokan: " Iniciato por Gardi *Hasanfeyf* Vivanta"-n. Estas kolektivo de aktivuloj kaj 88 organizaĵoj, inter alie medio-organizaĵoj, virin- kaj homajrajtoj-organizaĵoj, kulturasocioj, neregistaraj sindikatoj kaj reprezentulojorganizaĵoj de la damaĝitaj komunumoj. La koalicio atentigas pri la decida intereso ne delasi la batalon nun kiam la *Ilusi*-projekto atingas sian finstadion. Estas ankaŭ grave konscii ke Ilisu ne estas la fino de la historio kaj estas ankaŭ necese daŭre rezisti kontraŭ la same malutilaj turkaj planoj pri estontaj baraĵprojektoj. La pli kaj pli militistigo de la regiono kaj la kreskanta reprezalio de la ordokonservadservoj ekde 2015 ne evidentigas tion. Internacia apogo kaj solidareco estas pro tio des pli gravaj.

El la revuo Vrede n-ro 443

# Kiel la moderna homo konkeris la mondon

Ke niaj prauloj devenas el Afriko, pri tio ĝis hodiaŭ ne regas dubo. Sed oni ja pridiskutas la demandon kiam kaj kiel la moderna homo forlasis la Afrikan kontinenton. La klasika modelo priskribas la konkeron de la mondo kiel unfojan eventon, kiel migradon, kiu komenciĝis antaŭ 60 000 jaroj.



Tio tamen, laŭ nova studaĵo, apenaŭ estis tiel. Aldoniĝis ke la eliro al novaj kontinentoj okazis en pluraj ondoj. Kaj surpriza detalo estas ke Aŭstralion la moderna homo atingis signife pli frue ol Eŭropon. Tio starigas kelkajn demandojn.

Ĝis antaŭ nelonge la trovaĵoj de ostoj en Etiopio estis konsiderataj la plej malnovaj postrestaĵoj de nia specio. Ili aĝas 195 000 aŭ 160 000 jarojn. Sed en junio [2017] esploristoj raportis pri spektakleca malkovro: En kavo nordokcidente de Marakeŝo ili trovis homajn makzelojn, dentojn kaj ostojn kiuj aĝas 300 000 jarojn.

Tio plivastigas la horizonton konsiderinde, ankaŭ el geografia vidpunkto. Se oni pli frue pensis ke la homaro ekestis en orienta Afriko, nun klariĝas ke la moderna homo jam estis disvastiĝinta en praepokoj en la nordafrika regionego. Kaj en la sudo de la kontinento, kiel montras trovaĵoj de fosilioj en *Florisbad*, Sudafriko. Per tio perdiĝas la senco de la nocio "lulilo de la homaro". Ŝajnas ke ne ekzistis regione limigita lulilo. Kaj se ĝi ekzistis ĝi ampleksis la tutan kontinenton.

En la fruaj epokoj de la homaro okazis pluraj ondoj de migrado norden, la plej frua ondo verŝajne jam okazis antaŭ pli ol 120 000 jaroj. Alikaze la eploristoj ne povus ekspliki la ĉeeston de la plej malnovaj homaj fosilioj en Ĉinio - ili aĝas inter 70 000 ĝis 120 000 jaroj. Tamen tiuj pioniraj grupoj apenaŭ postlasis spurojn en nia DNA.

La plej granda parto de niaj genoj devenas de tiuj homoj kiuj partoprenis en la "klasika" elmigrado el Afriko antaŭ 60 000 jaroj. Tiu migra ondo certe estis la plej granda kaj la plej ampleksa.

Kaj poste? La konkerado de la Eŭrazia kontinento okazis malrapide, do ne tiom celite kiel oni tion imagis. En Aŭstralio la homo alvenis antaŭ proksimume 65 000 jaroj, en Eŭropo nur antaŭ 43 000 jaroj, kvankam Eŭropo situas pli proksime de Afriko. La kaŭzo kuŝas supozeble en tio ke en Eŭropo jam vivis la neandertala homo, dum Aŭstralio tiam estis senhoma.

Principe estis du itineroj laŭ kiuj la moderna homo migris al Azio. Unu el ili trapasas nordan Egiptujon ĝis la duoninsulo Sinajo kaj de tie al la Levanto; la alia tra la Korno de Afriko ĝis la araba duoninsulo. Ĉe tiu ĉi lasta tamen ne ekzistas rekta surtera kunligo. El tio sekvas: La homoj uzis boatojn por transiri la markolon.

Oni ne forgesu ke Arabio inter 70 000 kaj 120 000 jaroj antaŭ nia epoko estis plena de riveroj kaj lagoj. La regiono ofertis dum tiu epoko tre favorajn vivokondiĉojn. Oni malkovris tie eĉ fosiliojn de hipopotamoj kio indikas ke se eĉ tiaj bestoj povis alveni tie, tiam ankaŭ la homo sukcesis alveni.

Oni ne precize scias kial ĉiuj aliaj homaj specioj formortis. La lasta el ili, la neandertala homo, vivis ĝis antaŭ 30 000 jaroj en Suda Eŭropo. Evidente la homo sapiens plej bone sukcesis adaptiĝi al la diversaj vivokondiĉoj kaj tial kiel ununura homa specio transvivis ĝis hodiaŭ.

Esperanta Retradio



## Gustave Flaubert

**Gustave Flaubert, en esperanto Gustavo Flober' (naskiĝis la 12-an de decembro, 1821, mortis la 8-an de majo, 1880) estis franca verkisto.**

**En Esperanto aperis: *Simpla koro; Herodiasa; La legendo de Sankta Juliano Helpema.***

**Vikipedio**

## Jiří Mahen



**Jiří Mahen (naskiĝis la 12-an de decembro 1882 en *Čáslav* - mortis la 22-an de majo 1939 en Brno, suicido) propranome Antonín Vančura, estis ĉeĥa poeto, prozisto kaj dramverkisto.**

**En Esperanto aperis: *Hundo en la ĉielo; La koboldo Ondra; Lunatika*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**La egiptaj piramidoj de la Nekropolo de Gizo.**

**Vikipedio**